# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 192 MARTO 1997**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista )
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO.

*** *Sankta* **PIO X**-*a, preĝu por ni.* ***



# Sommaire/*Enhavo*


Pages/*Paĝoj*

Le mot du président - *La bileto de la prezidanto* 3
Prière - *Preĝo* 5
Saint-Martin de Tours
*Sankta Marteno de Tours* 6
A travers le monde - *Tra la mondo* 8
*Protokolo de la komitatkunveno de la 22/01/97* 9
*Kongreso en La Houssaye en Brie* 10
Inscription - *Aliĝilo* 13
Dans notre association - *En nia asocio* 14
Boite aux lettres - *Leterkesto* 17
Calendrier - *Kalendaro* 18
*50ème* Congrès International à Rome-Rimini
*50-a Internacia Kongreso en Romo-Rimini* 19
Anecdotes- *Anekdotoj* 20
Annonces - *Anoncoj* 21
Prière de Pâques - *Preĝo pri Pasko .* 22
Abonnements - *Kotiztabelo* 23


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass.Cath.Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9,Rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé


**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Estas bildo de tiu-ĉi jara kongresejo, "Le Prieuré Saint-Martin de La Houssaye - en - Brie " , domo de la Kamparanaj Misiistaj Fratoj.
(Foto: Frato J.R Marmou)

Kapelo



**L'esperanto.** Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 10.a de februaro,majo,aŭgusto kaj novembro.

Finpresado la 10/03/1997

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 192 Marto 1997**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de la Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES

<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623,3022@Compuserve.com



# Le Mot du Président

Le mois de mai approche et,avec lui,notre Congrès bisannuel qui,comme vous le savez déjà,se tiendra à La Houssaye en Brie chez les Frères Missionnaires des Campagnes. Frère Marmou a préparé un programme interessant qui rendra le séjour attrayant sous le beau ciel de l'Ile de France,ce qui ne nous empêchera pas de nous pencher avec intérêt sur l'étude de l'encyclique Populorum progressio.

Il convient donc que vous veniez nombreux au congrès.Si vous n'êtes pas encore inscrit,il est grand temps de le faire au plus tôt afin de faciliter l'organisation et le déroulement harmonieux du programme.

Vous le savez,j'aurais souhaité abandonner dès cette année la présidence de l'association.Cela ne sera pas possible,faute de candidat pour me remplacer.Il sera donc nécessaire que je demeure encore un peu de temps à la tête de l'association,ne serait-ce que pour ne pas mettre en péril son existence.Mais ce ne pourra être que provisoire et il conviendra que dans un an ou deux maximum quelqu'un de plus jeune accepte de prendre la relève, de donner à l'association un élan nouveau, en apportant ses idées et son désir de progrès.

A bientôt donc à la Houssaye en Brie.




# La Bileto de la Prezidanto

Alproksimiĝas la monato majo kaj kun ĝi nia dujara kongreso. Kiel vi jam scias,ĝi okazos en La Houssaye en Brie en la domo de la Kamparanaj misiistaj fratoj. Fto. Marmou preparis interesan programon,kiu igos alloga la restadon sub la bela ĉielo de Ile de France,kio ne malhelpos la atentan studadon de la encikliko Populorum progressio.

Konvenas do,ke vi venu multnombraj al la kongreso.Se vi ankoraù ne aliĝis,estas tempo por urĝe kaj rapide fari tion,por faciligi la organizadon kaj la harmonian disvolviĝon de la programo.

Vi jam scias; mi estus dezirinta forlasi tiun jaron la prezidantecon de la asocio. Tio ne ebleos,pro manko de kandidato por anstataùigi min. Do necesos,ke mi restu ankoraù ne tro longe por estri la asocion,nur por eviti endanĝerigi ĝian ekziston.Sed tio estos nepre provizora. Konvenos ke,post unu aù du jaroj, iu pli juna konsentos deĵori kaj alporti al la asocio novan instigon,alportante siajn ideojn kaj progresdeziron.

Do ĝis baldaù en La Houssaye en Brie.







## SILENTO

Kiam oni neniam provis, oni opinias, ke estas facile,
kaj ke sufiĉas voli tion,por ke estiĝu en si silento.
Sed tuj kiam oni vere provas,
oni konstatas kiel estas malfacile,kiel estas iu el la aferoj,
pri kiuj ni estas malplej kapablaj,
kaj pri kiuj nia volo havas malplej da povo.

Fratino Jeanne d'Arc
"Un coeur qui écoute"
(Trad.M.Colleu)

## LI VENU



Venu, vera Lumo
Venu, eterna Vivo
Venu, kaŝita Mistero.
Venu, sennoma trezoro
Venu,senkrepuska lumo
Venu,eterna ĝojo,
Espero,kiu deziras savi ĉiujn.
Venu,resurekto de la mortintoj,venu.
Venu,ho Vi,
Vi,kiu deziris,ke mi volu vin.
Vi,nepre nepenetrebla
Venu,impeto de mia vivo
Venu,konsolanto de mia koro.

Simeono la teologo,11-a jc.

# Sankta Marteno

*Pli ol iam,Sankta Marteno [Saint-Martin de Tours], "la homo kun partigita mantelo",restas aktuala. Ĉie okazos kulturaj kaj religiaj eventoj okaze de la 16.a jarcento de lia morto . (Jaro de Marteno 10.11.1996 ĝis 16.11.1997).Ĉiuj estas invitataj partopreni laŭ sia maniero.*

Sankta Marteno naskiĝis en Szombathely en Hungario en 336. Lia patro,pagano kaj veterano en la roma armeo,elektis tiun nomon honore al Marto,Dio de la milito.
De 341 ĝis 350 li trapasas normalan infanecon en Pavio Italio, krom dutaga fuĝo por kaŝe demandi al iu pastro pri la kristana kredo.
Kiam li estis 15-jaraĝa , lia patro sendas lin en la imperiestran romian armean gvardion, kaj foriras al Amiens. Iun vintran tagon, en unu el la urbaj pordegoj, Marteno, per sia spado, duontranĉas sian klamidon (blanka senmanika mantelo de la imperiestra gvardio), kaj donacas parton al iu duonnuda mizerulo. En tiu sama urbo, Marteno ricevis la bapton en sia 18-a jaro.
En 356 la imperiestro kaj lia gvardio iris al Worms (Germanio), kiu estis sieĝata de la germanoj. La antaŭvesperon de la batalo, Marteno, publike asertas, ke li servos Dion kaj promesas esti sen armoj nek kasko antaŭ la linioj sub la protekto de la Krucosigno. Matene, dum Marteno preĝis la tutan nokton, la Germanoj proponas negoci pacon. Post tiu evento,li forlasas armeon kaj renkontas la episkopon de Poitiers Sankta Hilario, kiu defendas la diecon de Kristo,sed Marteno ĉiam revas pri soleco. Antaŭ ol saluti la mondon, li deziras ankaŭ revidi la gepatrojn.



Do li iras en Hungario (Panonio) kaj konvinkas sian patrinon aliĝi al kristanismo,sed li estas forĵetita de sia patro. Ne sciante kien iri,li haltas proksime al Milano en Italio kaj vivas kiel ermito. Kelkaj samideanoj kuniĝas al li kaj fondas malgrandan monaĥejon. Sed li devas denove fuĝi sur la insulon Gallinara, kaj tie vivi per sovaĝaj herboj.
En 360 li denove iras al Poitiers kaj fondas la unuan monaĥejon en Gaŭlo. Marteno akceptas esti diakro kaj poste pastro. En 371 kiam mortis la episkopo de Tours la urbanoj perforte elektas lin nova episkopo de Tours. Li deĵoros dum 26 jaroj. Sed Marteno, restas simpla; kun kelkaj fratoj ili trakuras tutan Gaŭlon por anonci Kriston, detrui idolojn, bapti kamparanojn kaj kunligi ilin en paroĥoj. Lacega li mortas proksime al siaj disĉiploj la 8.an de novembro 397. Li estas entombigita en la tombejo de Tours.



"La homo kun partigita mantelo" aperas en multaj vitraloj de niaj preĝejoj. Lia ago per lia mantelo ne estas malnova. Kiel instruas la Evangelio (Mateo 25) , Marteno donis lian mantelon al Kristo. Tiu gesto resumas la vivon de la kristano:"ami sian proksimulon, kiel si mem ". Nun tiu sanktulo estas fama. Lia senmanika mantelo ,nomata en la franca "la chape" estis tiel fama, ke ĝi aperigis vorton "chapelle" (kapelo). En Francio ekzistas 3370 preĝejoj,kapeloj kun la nomo "St-Martin". Eĉ nia ĉi-jara kongresejo !

# TRA LA MONDO

<u>Rusio :</u> La Katekismo de la Katolika Eklezio estas eldonita en rusa lingvo.Krom la litova versio, ĝi estas la unua traduko por la ekssovetaj landoj. Nuntempe tiu katekismo ekzistas en 25 lingvoj,el kiuj 6 estas sur CD-ROM kaj unu en Internet.

<u>Afriko:</u> Afrika episkopa rimarko pri la kristanoj de la nigra kontinento : Ili estas kiel ranoj.Kiam la akvo iĝas malklara ili saltas teren kaj kiam estas problemoj tere ili rapidas en akvon. Same la kristanoj matene recitas rozarion kaj posttagmeze iras ĉe sorĉisto.
(laŭ Asocio de la episkopoj de Afriko kaj Malagasio).

## AŬSKULTU VATIKANAN RADION

Elsendoj en **Esperanto** :

<u>DIMANĈE</u> - Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (10')
Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005(74.90 m),5880 (51.0m)
Satelite : Eutelsat II-F1,13 E 10.987 GHz,transponder 25,
Video NBC S,subportanto 7.39 MHz FM,Panda 1,Vert.Polar.

<u>MERKREDE :</u> Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (14')
Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 6185(48.50m),7365(40.73m)

**Kaj skribu al : Radio-Vatikana - Esperanto Redakcio**
**SCV-00120 CITTA del VATIKANO**
**http://www.wrn.org/vatican-radio/**

**POLA RADIO** :Elsendoj en esperanto ĉiu-tage !
15h30 31,50m;41,18m;41,99m;50,00m(9525,7285,7145,6000kHz)
22h30 41,27m;49,71m;49,22m (7270,6035,6095 kHz)
Per satelito: Eutelsat II F-3-16 gr. orienta lat., 11.080 GHz H
Subportanto 7,38 MHz . Ĉiutage : 06h30 - 15h30 kaj 20h00
Pola Radio-Esperanto Redakcio PF 46 PL-00977 VARSOVIO

La Itala Radio ( **RADIO ROMA/RAI)** elsendas en esperanto ĉiun sabaton je la horo 21a en 7235 kHz au 6015 kHz
**Ankaŭ** satelite en Eutelsat HB1,13E Subp.7.56 Rai2 11.446 Mhz



# Protokolo de la Komitatkunveno de la 22-a de Januaro 1997

Ĉeestis :F-to Marmou,F-ino Chaney,S-roj Bessière,Despiney,Lafargue,Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: Pastro Bourdon,S-ino Lafargue,F-ino Michel,S-roj Colas kaj Colleu.

S-ro Villeneuve prezentis la financan raporton por la jaro 1996. Vi legos tiun raporton aparte sur la bulteno.La indikitan malprofiton kaŭzis la monhelpo donita por la eldono de la libro "Dio parolas al siaj infanoj".

F-to Marmou alportis la lastajn informojn pri la kongreso en La Houssaye en Brie,precipe pri la vesperoj,en kiuj oni prezentos filmojn kaj diapozitivojn.

Kvar kandidatoj prezentis sin por la renovigo de 1/3 de la komitato: S-roj Basso,Bessière,Despiney kaj P-ro Bourdon.

Niaj protestantaj fratoj preparas la ekumenan kongreson en Nantes,venontjare.Nia asocio alportos sian helpon al tiu kongreso,kies detaloj ankoraŭ ne estas konataj.

La bulteno,bone redaktita de s-ro Basso,plaĉas al niaj membroj.Pluraj skribis por danki kaj gratuli.Ekde nun s-ro Basso zorgos ankaŭ pri la ekspedo.

La komitato studis ankaŭ la eblecon de ekumena diservo okaze de la Universala Kongreso en Montpellier , en 1998.

S-ro Pons aktive preparas,kunlabore kun AED,la eldonon de la libro "Dio parolas al siaj infanoj" . Li jam anoncis ,ke la afero bone progresas. Li esperas,ke la libro estos finpreta venontan aŭtunon.

La komitatkunveno okazos en La Houssaye en Brie la lundon 26-an de majo 1997.

**KONGRESO en LA HOUSSAYE EN BRIE**
**(Seine et Marne) 23-27/05/1997**

Kongresejo: Prieuré Saint-Martin
149,Rue Etienne Jodelle
77610 La Houssaye en Brie
Tel: 01 64 07 41 25 Fakso : 01074573

PROGRAMO:

Vendredo 23/05 :
- Vespere : interkonatiĝo, babilo

Sabato 24/05 :
- Matene :religia temo: "Encyclique de Paul VI :
Le développement des peuples (ed. Centurion) .
Bonvolu legi tiun libreton antaŭ la kongreso.
Pastro Louis Bourdon, O.P, (nia religia konsilanto) prelegos pri la komentario de tiu enciklíko.
- Posttagmeze : ĝenerala kunveno
Diservo (dimanĉa liturgio)
- Vespere : distraĵo,videokasedo aŭ lumbildo.

Dimanĉo 25/05 : Tuttaga ekskurso per buso .
-Matene:Euro-Disney-Land (ekstera vizito) belega vidindaĵo.
- posttagmeze: parko kaj kastelo de "Vaux-le-Vicomte", konstruita de "Fouquet",XVII. a jarcento sub reĝado de Ludoviko la XIV.a (interna vizito),instruega vidindaĵo.
- vespere : distraĵo kaj babilo .

Lundo 26/05 :
- Matene : Komitatkunveno, kaj Diservo .
-Posttagmeze:Vizito de Priorejo kaj vilaĝo"La Houssaye"videokasedo kaj lumbildoj pri la vivo de abeloj, komentario de Frato René-Jean Marmou,abelbredisto.
-Vespere : Konkludo de la kongreso ! ...



Mardo 27/05 :
- foriro, post la matenmanĝo .

Horaroj de manĝoj : matene je 8.30, tagmeze : 12.30
vespere je 19.30 .

KIE SITUAS LA KONGRESEJON ?

Correspondances entre les trains et les autocars desservants LA HOUSSAYE en BRIE .
Les autocars ne fonctionnent que les "jours ouvrables",du lundi au vendredi inclus.



(Ĉi-apude bildo de la Preĝejo kaj Placo de la bus-haltejo)

A PARIS-EST BANLIEUE, pour MARLES-en-BRIE
direction:COULOMMIERS
- monter en queue de train avec le billet "grande ligne" demander 2 tickets "contremarque de passage" au quai du train-banlieue ou présenter votre billet à la cabine vitrée, sise au milieu des passages-tourniquets,le controleur vous ouvrira le passage d'accès aux trains de banlieue.
A Marles,le car est au parking BUS,près de la gare,coté route,préciser au chauffeur votre destination "La Houssaye",descendre à l'arret: Place du M-al Augereau,devant le Café-Tabac ,la Mairie et l'église.La rue Etienne Jodelle est direction Sud,les numéros sont métriques,le 149 est à 149 mètres du début de la dite-rue.

Si vous venez en auto,de Paris-Porte de Bercy par l'autoroute A-4,sortie N°13 PROVINS (sans péage), jusqu'à l'Obélisque, direction MELUN,LA HOUSSAYE 4 km, entrée : centre-ville pour la place M-al Augereau (église et mairie), puis direction sud pour la rue Etienne Jodelle N°149.

Si vous venez de METZ-NANCY par la A4-, sortie: COUTEVROULT-MELUN,jusqu'à l'Obélisque (ensuite voir ci-dessus).

Si vous venez de NANCY-SEZANNE,par la N-4 jusqu'à FONTENAY-TRESIGNY,direction LA HOUSSAYE = 5 km.

Si vous venez de MELUN,direction : MEAUX par la N-36,jusqu'à FONTENAY-TRESIGNY,puis direction LA HOUSSAYE = 5 km.

En résumé,consulter vos cartes routières,où LA HOUSSAYE-en-BRIE se situe au centre du département de la Seine-et-Marne. Vous trouverez un "parking" situé dans les cours intérieures du Prieuré St-Martin.

Horaire des Trains à PARIS-EST,départs BANLIEU.
Direction : Coulommiers (Pour Marles-en-Brie)sans changement

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| PARIS-EST(départ) | 17.04 | 17.40 | 18.22 | 19.10 |
| Tournan (arrivée) | 17.35 | 18.13 | 18.56 | 19.41 |
| Marles-en-Brie(arrivée) | 17.43 | 18.20 | 19.04 | 19.48 |
| | | | | |
| CAR-Bizière | | | | |
| Marles-en-Brie (départ) | 17.48 | 18.25 | 19.09 | 19.53 |
| La Houssaye | 17.55 | 18.32 | 19.16 | 20.00 |

Samedi et dimanche: un train sur deux, et pas de Bus ! appeler un taxi.



## ALIĜILO al la KONGRESO en LA HOUSSAYE

(Sendu ĝin antaŭ la 30.an de aprilo 1997 )

**Bonvolu tranĉi la aliĝilon en paĝo meze de tiu bulteno kaj sendi kun via ĉeko al :**

Frato René-Jean Marmou
Prieuré Saint-Martin
149,Rue Etienne Jodelle
77610 LA HOUSSAYE-en-Brie
Tel: 01 64 07 41 25

Aliĝkotizo al la kongreso .............................60,00 Frs
Kompleta pensiono (de vendredo 23.a de majo vespere ĝis mardo 27-a de majo 97 matene; inkluzive ekskurso per buso kaj enirbiletoj de vizitoj.....................................................1000,00 Frs

----------

Sume : 1060,00 Frs

Bonvolu pagi per p.ĉ.k al :
Association Catholique Française pour l'Espéranto.
CCP ROUEN 2 324 93 N

(Por kiu partoprenos nur parton de la kongreso,ni dekalkulos la nutraĵojn surloke. Anoncu la datojn kaj horojn de via alveno kaj foriro.)

La kongresejo enhavas kunvenejojn kun afiŝtabulo,lumbildo,projekt-televidilo kaj belegan kapelon. La personaj ĉambroj entenas littukojn kun varmaj kovriloj kaj tualettukoj , varman akvon. (duŝejo en kelkaj geedzaj ĉambroj) . Eblas promenado en 5 ha parko kaj arbaro. Resume : konforta domo por akcepti gekongresanojn.Venu kaj vi vidos tion.

## KONGRESA ALIĜILO

Sendota al : Frato Marmou
Prieuré St-Martin,
F-77610 LA HOUSSAYE-en-BRIE
nepre antaù la 20.an de aprilo 1997.

Tranĉu laŭ la linio.

Nomo kaj voknomo :..................................................
Adreso:...............................................................
.....................................Telefono : ...................
Naskiĝdato (nur por infanoj) :.........................................

Mi aliĝas al la kongreso en La Housaye kaj pagas al :
ACFE pĉk ROUEN 2324 93 N :
Aliĝkotizo ( 60,00 F) : .................. F
Tutkompleta kongres-restado
(tranoktado,manĝoj kaj ekskurso )
1000 F x ......... personoj=: ....................F
Donaco (libervola ) ....................F
N.B: Bonvolu kunporti buŝ-kaj tualet-tukojn.
SUME : ...................F

Mi alvenos en la Houssaye- en-Brie per aùto/trajno (1)
la .........an de majo je la ..........horo kaj foriros
la .......an de majo 1997 je la ..... horo.
Akompanos min ......... personoj.
Dato: .......... Subskribo

(1) Forstreku la senutilaĵon.

Tranĉu laŭ la linio.

## VOĈDONILO

1) Ĉu vi aprobas la agadraporton ?

JES NE SINDETENO (1)

2) Ĉu vi aprobas la financan raporton ?

JES NE SINDETENO (1)

3) Renovigo de 1/3 de la komitato.
Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj.
Vi rajtas forstreki nomojn,sed devas esti maksimume 4 nomojn entute.

S-ro BASSO Pastro BOURDON

S-ro BESSIERE S-ro DESPINEY

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

Sendu ĝin al :
F-ino Chaney
56,Rue de Corvisart
75013 PARIS
nepre antaù la 20.a de aprilo 1997

## EN NIA ASOCIO

Dum la jaro 1996,nia asocio daŭrigis sian agadon,kvankam ĝi ne havis kongreson sed nur ĝeneralan kunvenon.Tiu-ĉi okazis la 4-an de majo 1996 en Parizo.F-ino Chaney,nova sekretariino,anstataŭis F-inon Preux;S-ino Lafargue kaj F-ino Michel eniris la komitaton.La asocia sidejo estis translokita de Baugé al Parizo,56 Rue Corvisart .
La ĉeestantaj membroj dankis al F-ino Preux pro ŝia senlaca kaj fervora laboro por nia aocio kaj aplaŭdis ŝin.
La asocio aĉetis ekzempleron de la ĵus eldonita meslibro kaj ,uzos ĝin okaze de niaj kongresaj diservoj.
Dank'al la persista,senlaca kaj forta laboro de S-ro Pons,kiu longe baraktis por venki ĉiujn obstaklojn,la libro "Dio parolas al siaj infanoj" estos eldonita en esperanto,kunlabore kun AED. La asocio alportis monhelpon de 15000 F. al la afero.
La prezidanto,kiu maljuniĝas,anoncis ,ke li deziras transdoni sian oficon al alia persono.Bedaŭrinde neniu,ĝis nun,konsentis fariĝi lia posteulo; li do provizore restos prezidanto.
La plej grava ŝanĝo estis la apero de novaspekta bulteno,redaktita de S-ro Basso;ĝi estas plaĉa,bele presita;jam pluraj legantoj salutis la eldonon per kuraĝigaj leteroj.
Dum la jaro 1996 ni bedaŭris la forpasojn de pluraj el niaj membroj:
S-ro Albu (Rumanio) Pastroj Cote (Lyon) Ouarnier (Villequier-Aumont) kaj Ruth (Lisieux), S-ro Lecroisey (Montpellier),F-ino Ravenstein(Marseille).
En 1996,plej ofte pro forgeso pri la pago de la kotizo,nia membraro malkreskis de 154 en 1995 al 126 en 1996.Tamen ni devas ne perdi kuraĝon kaj nepre daŭre klopodi por konatigi nian asocion.



Novaj anoj 1997 : 1/ S-ino LEROUGE (P-de-C),
2/S-ro NEAU(Vendée)
Bonvenon al la genovuloj .

Donacis monon : S-ro THIOLLIERE,S-ino CHIALVO,S-ro VANSPRANGHE.
Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

Bonfarantoj 1997: 1/ S-ro LECOCQ(I-et-L),2/S-ro DESPINEY(V-de-M),3/S-ino LAFARGUE(V-de-M), 4/S-ino GILLES (Bas-R)

**FINANCA RAPORTO 1996**

| **ENSPEZOJ** | | **ELSPEZOJ** | |
|---|---|---|---|
| | | | |
| Kotizoj | 4430,00 | Bulteno | 2139,03 |
| Donacoj | 975,00 | Korespondado | 1276,97 |
| Rentumo ŝparkaso | 192,79 | Komitatkunvenoj | 1395,00 |
| Kongreso | 0,00 | Kongreso | 0,00 |
| Kotizoj UFE IKUE | 1480,00 | Kotizoj UFE IKUE | 1207,35 |
| | | Poŝta takso | 6,00 |
| | | Donacoj | 744,00 |
| | | Libro eldonado | 15000,00 |
| | | | |
| SUMO | 7077,79 | SUMO | 21768,35 |
| | | | |
| Enla kaso 01/01/96 | 31181,80 | En ŝparkaso | 11329,47 |
| Negativa saldo | 14690,56 | En P.Ĉ.K | 5161,77 |
| En la kaso 31/12/96 | 16491,24 | | 16491,24 |

La Kasisto : G. Villeneuve.

## Ni funebras kaj kondolencas .

**Forlasis nin ĉi tiu nia frato :**

**- Pastro Raymond RUTH**
en LISIEUX

***Al la familioj, sincerajn kondolencojn. Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiuj karaj geamikoj kaj gefratoj en Kristo.***

## RENOVIGO de 1/3 de la KOMITATO

Instrukcioj por la voĉdonado:

1)Respondu al la demandojn 1 kaj 2 sur la voĉdonilo kiu estas en aparta folio meze de la bulteno.

2) Enmetu la voĉdonilon en koverto sen-indiko

3) Enŝovu ĉi-tiun en alian,kiun vi sendu al la sekretariino
- F-ino Chaney
56,rue de Corvisart
75013 PARIS ,

antaŭ la 20-a de aprilo 1997.

4) Dorse de tiu koverto;skribu la vorton VOĈDONO kaj vian nomon.

**Atentu !** Ne sendu ion alian en ĉi tiu koverto, kiun oni malfermos nur en la Kongreso la 24-a de majo 1997.



## LETERKESTO

*" ..Kiel ĉiuj scias, la lasta Internacia Kongreso en Francio okazis en Marseille dum somero 1957. Do , venontjare,estus bone se ni povus proponi al niaj eksterlandaj gesamideanoj memorindan kongreson.Jam, en novembro 96, venis delegacio de UEA, s-roj Osmo Buller kaj Nikola Raŝiĉ,por kontakti nian delegitinon en MONTPELLIER,s-ino VIERNE.*

*Organizi Tutmondan Kongreson estas grava afero. Pro tio, la montpelieraj gesamideanoj bezonus multe da gebonvolemuloj por helpi dum la Kongresa Semajno-certe- sed ankaŭ antaŭe kaj poste.*

*Se vi intencas partopreni de la 1a ĝis la 8.a de aŭgusto 98 kaj bonvolas helpi ,*

*Se vi povus libertempi unu semajnon antaŭe aŭ poste (aŭ la du ),*

*bonvolu vin proponi REKTE :*

*al :* Doktorino Yvette VIERNE
5,Rue du Docteur ROUX
34090 MONTPELLIER.

BONVENON KAJ ELKORAN DANKEGON .

Ghislaine ZARCA, Nice

Notu:Mi mem intencos ĉeesti dum la 3 semajnoj. (G.Z)

# KALENDARO

**1997**

| | |
|---|---|
| 23/05 ĝis 27/05 | LA HOUSSAYE-EN-BRIE<br>Kongreso de Franca Katolika Esperanto Asocio. |
| 23/06 ĝis 29/06 | GRAZ (Austio)<br>2a Eùropa Ekumena Kunveno<br>(Organizas Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI |
| 19/07 ĝis 02/08 | SEBRANICE (Ĉeĥio) apud Litomysl<br>17-a IKUE E-Tendaro Prezo : 400 FF<br>Oni dormas en 2-litaj bonkvaliatj tendoj.<br>Ĉiu tendara tago komenciĝos per esperantlingva Sankta Meso en tendara kapeleto .<br>Por la tuta dusemajna restado pagos gejunuloj nur 350 FF (inkl.manĝoj), ( 410 FF por plenkreskuloj) |
| 18/08 ĝis 24/08 | PARIZO<br>12a. MONDAJ JUNULARAJ TAGOJ |
| 31/08 ĝis 08/09 | ROMO-RIMINI (Italio)<br>50-a jubilea IKUE-Kongreso<br>Temo: "Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj ".<br>Merkrede 3.9 Aùdienco ĉe Papo .<br>(Vidu programon kaj aliĝilon p.19) |

**1998** Augusto : UNIVERSALA KONGRESO en MONTPELLIER



Jen la emblemo de la 50a IKUE-Kongreso, realigita de d-ro Mario Guilla, grafikisto, kunlaboranto de la revuo de la itala IKUE-sekcio. Ĝi kunmetas la Bazilikon de Sankta Petro (kies kolonaro etendiĝas kvazaŭ ĉirkaŭbrake) kaj la stilizitan bildon de la Arko de Aŭgusto en Rimini.

## 50a IKUE-KONGRESO

**ROMO-RIMINI**

**31/8 - 7/09/97**

Kun la alta patroneco de la Itala Respublika Prezidanto.

Adreso: Centra Oficejo de IKUE
Via di Porta Fabbrica, 15
I-00165 ROMA RM
Tel/Fax : (06)63.28.39

Programo:

31/08 : Alveno, 19.00 Sankta Meso - Interkona vespero
01/09 : Eble Diservo en Sankta Petro- Inaùguro
Audienco ĉe la Itala Respublika Prezidanto,
Lia Ekscelenco Oscar Luigi Scalfaro.
Vizito de basiliko- vespere Rozario al S.Petro
02/09 S.Meso - Prelego - Vizito de la urbo.
03/09 Audienco ĉe la Papo - Foriro al Rimini.
04/09 Libera mateno, ekumena diservo
Krozado en maro.
05/09 Ĝenerala asembleo de IKUE
Vizito de la ŝtato: San Marino
Vespere: greko-katolika diservo
06/09 Libera mateno por vizito, muzika vespero
07/09 Diservo, Fermo de la kongreso.

Kongreskotizoj : ĝis 30.04.1997 180 FF poste 250 FF
(junuloj: <30 jara) rabato 50%

Prezaro por la restado dum la tuta kongreso en ROMO kaj RIMINI

En ROMO de la 31.08 vespere ĝis la 3a de septembro tagmeze, kun 2 manĝoj tage: matenmanĝo kaj vespermanĝo-inkl. de trinkaĵoj.

En RIMINI de la 3a. de sept. vespere ĝis la 7a de septembro tagmeze,kun 3 manĝoj -sen trinkaĵoj.

-en 2-lita aù 3-lita ĉambro kun necesejo : ≃ 900 FF

-en 1-lita cambro kun necesejo ≃ 1400 FF

Aliĝiloj kaj kostoj por partatempa restado: bonvolu peti la detalojn al : IKUE en Romo aù al la redaktoro)

Rim: La redaktoro partoprenos en la kongreso de ROMO kun sia familio.Jam aliĝis 12 personoj el Francio.

## ANEKDOTOJ

Du virinoj, kun siaj filinoj renkontiĝas :

La 1-a: Kiom bele kreskis vian filinon ! ĉu ŝi ankaù bone studas ?

La 2-a: Jes,ŝi scipovas paroli du lingvojn. Kaj la via ?

La 1-a: Nur 2 ? La mia, scipovas 4 : anglan,algebra,esperantan kaj italan .

Turnante sin al sia filino,ŝi aldonas : " Karulino, diru kelkajn vortojn algebre al sinjorino "

(Ghislaine ZARCA - Nice)



## ANONCOJ

04/ LABOR-GRUPO 1996-97

"Paco kaj Esperanto - Kiel la religioj povus kontribui al la paco . "

Unu sabato monate de 14h 30 ĝis 16h30

Dato: 12/04 - 10/05 kaj 14/06

Adreso: Couvent des Dominicains
7,Av. Salomon 59800 LILLE
Tel: 0320149696
Trama haltejo : "Saint-Maur"

06/ Ĉu iu ŝatus registri tiun gazeton per magnetofona kasedo por ke blinduloj povu aùskulti ? (Philippe)

07/ Haveblas jam kandeloj kun esperantaj surskriboj .

Post sia pensiigo s-ro Tuinder trovis tre interesan laboron kiel volontulo en metia kandelfarejo,ligita kun mondfama abatejo benediktana. Ankaù vi povas mendi kandelon okaze de Pasko aù Pentekosto,naskiĝo,bapto aù geedziĝo !

Ĉiun kandelon oni pentros aù ornamos laù via gusto kaj konforme al ĉiuj deziroj viaj.

Estas jam haveblaj kandeloj kun la surskriboj : "Esperanto,Lingvo Universala,Fariĝu Lumo, ".

Skribu en Esperanto al :

Abatejo S-ta Adelberto, Abdijlaan 26,
NL -1935 BH EGMOND-BINNE .
Nederlando

(el la gazeto de niaj protestantaj fratoj "DIA REGNO "01/1997)

## PREĜO

De la Morto al la vivo !
Pasko, tempo de la internaj transmigradoj,
printempo post la vintro de la duboj,
Kolora naskiĝo post la grizaĵo de la macerado
kresko post kreiva enfosado.
Pasko, tempo de la elektoj
vivo antaŭ timoj
ekzisto antaŭ sufokiĝo
estonteco antaŭ pasinteco
aventuro antaŭ sekureco.
Pasko, tempo de la ĝojo
triumfo de la amo
promeso de ĉeesto
donaco de la senkosteco
malfermo de la nuntempo.
FELIĈAN PASKON !



O Kristo, estu la vivovekanto, kiun ni atendas
legigu al ni la signojn de la alvoko por ami kaj por lasi nin ami.
Vi, kiu vetis pri amo de la komenco ĝis la fino de via homa vojo,
Vi, kiu estas Vivo en via vojo al Dio.

(el la bulteno: Sentiers Nro 8- Chemin de Vie - Oeuvre Chrétienne d'Adoption)

**FELIĈAN PASKON .**

## *E-Novaĵoj*

Monumento al Patro PIO el Pietrelcina estis inaŭgurita la 10.an de novembro 1996 ĉe la paroĥejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo en RIMINI (Italio).Ĝi estas la unua siaspeca en Rimini kaj en la mondo.Ĝin starigis la loka preĝo-grupo de Patro Pio kunlabore kun la internacia kaj itala katolika esperanto-movado.Ĝi surhavas dulingvan skribaĵon, en la itala kaj Esperanto: " Patro Pio, Sacerdoto kaj Viktimo". Pere de Esperanto du kromaj bronzaj statuoj de Patro Pio estis liveritaj kaj donacitaj,kiel signo pri ĝemeliĝo,al paroĥejoj en Kiev(Ukrajnio) kaj Oradea (Rumanio). Kvankam li ne estas sankt-proklamita, Patro Pio estas tamen konata,amata kaj omaĝata en la 5 kontinentoj. Pro tio,aldone al la esperanta skribaĵo,la piedestalo staras sur ronda platformo,kiu reprezentas la esperantistan ŝildon,la kvinpintan verdan stelon sur blanka fono. (el Espero Katolika 1-2/97)

## Kotiztabelo 1997

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 140 F
Peranto : S-ro M. COLLEU
95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES
P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .

A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo : 60 F
geedza paro : 80 F
infano ĝis 16-jara,pastro,religiu(in)o : 30 F
bonfaranto :200 F
U.F.E kun Revue Française" kaj "E° Actualités" :300 F
U.E.A kun "Esperanto" kaj Jarlibro :310 F

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 1er trimestre 1997 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO